FN PER ANC 47

# NORMANDA ESPERANTO - BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

N° 28 - JUNIO 1974

Redaktas : Sro Jouis - 62I, rue G. Mugnier - 76 BOISGUILLAUME

---

Sendu la manuskriptojn antaŭ la : I0a de februaro - I0a de Majo - I0a de Aŭgusto - I0a de Novembro -

## LA NOVA PREZIDANTO PAROLAS.....

### - POST NIA REGIONA KONGRESETO -

La esperantistoj kiuj loĝas en nia provinco kunvenis la I7an de Marto en Grand Quevilly.

La gratuloj ricevitaj post tiu kunveno atestas pri la kontenteco de la kongresintoj kaj pruvas ke industria ĉirkaŭurbo tre bone taŭgas por organizi tian kongreson malgraŭ la manko de turisma allogo.

Sro Jouvin estis la animo de la Organiz-Kongres-Komitato. Lin, ni devas precipe danki kaj gratuli sed dankindaj kaj gratulindaj estas ankaŭ la multaj ne-esperantistoj kiuj materie kontribuis por la organizado. Tiu-ĉi kongreseto havis ja la aparteco[n] ke personoj ne parolantaj nian lingvon helpis la junan Esperanto-fakon de la laika amikaro. Ne Ekzistas sendependa Esperanto-rondo en Grand-Quevilly, sed ĉu ne estas pli bone starigi Esperanto-fakon de iu asocio kiu povas helpi finance kaj materie ol starigi sekteca[n] sendependan grupon ? Depost multaj jaroj, ni vokas la homojn alveni al ni; ĉu ne estus pli efike enpe[netri] en la vicojn de aliaj ? ĉu en junuldomon, ĉu en kulturcentron, ĉu en laika amikaron, ĉu en filozofian aŭ religian, aŭ partian grupon ? Kompreneble, se la esperantistoj havus profitojn de tia enpenetrado, ili havus ankaŭ devojn kaj devus kontribui al aliaj aktivaĵoj aŭ

.../...

...aŭ administraciaj taskoj de tiu societo. Ili devus sin montri la plej aktivaj tiel pruvante la seriozecon de nia idealo sed ankau la larĝanimecon de niaj samideanoj.

La kongreseton partoprenis nur kelkaj dekoj da esperantistoj. Ĉu vere tiom malmultaj ni estas en Normandio ? Kie estis la aliaj kiuj finlernis Esperanton depost multaj jaroj ? Verdire, mi estis iom ĝenata kiam la urbestro-deputato Sro Tony LARUE honorsalutis la kongresanaron. Ĉu tia malmulteco ne estas ia kontraŭpropagando ? Mi scias ke nia provinco estas granda; kiam n ni kongresas en Sud-Normandio, malmultaj nordanoj povas partopreni kaj same por la sudanoj kiam ni kunvenas norde, sed kial la samideanoj kiuj loĝas en Rouen, Sotteville aŭ en Yvetot ne aliĝis le Kongreson ?

La estraro de nia U N E kiu kunvenos komence de Junio devos, inter aliaj taskoj, difini la rolo[illegible] nia unuiĝo, kolekti adresaron de ĉiuj esperantistoj [illegible]trovi rimedojn por konvinki ilin ke ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj en nia asocio.

Petro KIJÔ -

DANKOJ AL LA ĈEESTANTOJ

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Nia Normanda Kongreso estis granda sukceso. Ĝi estis tiel ĉar kun mi la " kutimaj " amikoj kaj la aliaj helpintoj multe zorgis por tio, sed .... kiel estus kongreso eĉ bone preparita se neniu partoprenus ?

Nia kongreso estis sukceso ankaŭ [illegible]al la kvardek ĉeestintoj, kiuj partoprenis en ĝi. Por [illegible]ĉeesto, ili faris grandan propagandon por Esperanto. Ili ankaŭ rekompensis nin por niaj streboj kaj klopodoj.

Tial mi tie, multe dankas ĉiujn la normandajn esperan-

.../...

....tistojn kiuj respondis al niaj alvokoj, partopreninte en ĉiuj aranĝoj de la kongreso. Tia maniere, mi multe dankas nian japanan amikinon Kazue SUGAŬAVA, kiu per ŝia ĉeesto konkretigis nian pacan kaj amikecan ideon.

Pierre JOUVIN -

==========================================================================

## POST LA NORMANDA KONGRESO EN GRAND-QUEVILLE
## I6 - I7 / 3 / I974

---

Kiel respondeculo pri la Normanda Esperanto Bulteno, mi devas ĉi-tie diri mian ĝojon pri la bona sukceso de la Normanda Kongreso en Grand-Quevilly.

Kvankam ankoraŭ freŝdataj esperantistoj, la Quevilly-anoj ne hezitis, ĉirkaŭ sia Prezidanto S-ro Jouvin, preni la pezan kaj delikatan taskon organizi 2 kongresajn tagojn :

Unue : por la Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj, malfermata al ĉiuj -

Due : por la Normanda Federacio de la Esperanto Kultur-centroj, rezervata por la membroj de tiu Federacio.

Mi ankaŭ ĝojas ke niaj amikoj en Grand-Quevilly ricevis grandan apogon de la du amikaloj, kaj de la estrero de la urbo. Sed S-ro Jouvin, pli bone ol mi, disdonos la dankojn al tiuj kiuj oferis sian tempon kaj konojn por la preparo de tiu manifestacio.

Krom la ĉeesto de ĉarma japano Fraŭlino Kazue SUGAUARA, mi devas indiki ke fidela angla samideano, S-ro Mc LENNAN, el EXETER, signis sian intereson por UNE, sendante interesajn poŝt-markojn al la kongreso.

Iu ideo venis al mi kiam mi vigle interparolis kun Fino Sugaŭara. Ni scias ke multaj urboj nun ĝemeliĝas. Kompreneble, la esperantistoj aprobas tiujn ĝemeliĝojn; sed nur kelkaj ĝemeli-guloj akceptas la malfacilan laboron bone lerni la lingvon de la aliulo.

Cetere, eĉ se la lernado de la naciaj lingvoj progresas dank'al tiuj ĝemeliĝoj, tio ne solvas la problemon de facilaj interrilatoj inter ĉiuj lingvaj grupoj da homoj. Nur Esperanto povas tion fari.

Mi ankaŭ volas raporti pri diro de Kazue Sugaŭara : mi lernas la francan lingvon kaj nun povas ekrilati kun viaj sam-landanoj, sed nur en Esperantujo mi trovas la homan varmecon, la "internan ideon " kiu plaĉas al mi !

Do, ne sole por praktikaj rilatoj ni devas lerni la lingvon de Zamenhof, sed ankaŭ por varmi[illegible] korojn ĉe la flamo de la "interna ideo " tiu de la fr[illegible] inter ĉiuj homoj.

Kaj se ni estas konvinkitaj pri la valoro de tiu celo, ni devas apliki niajn fortoĝn al pli kaj pli bona kono de la lingvo, tiel ke ni povu pli kaj pli bone ĝin utiligi parole kaj skribe. Vi rimarkas ke nia Bulteno estas esperante redaktita. Tio, ĝuste estas por apliki la ĉi-supran diraĵon, kaj kutimi vin al la legado de la lingvo. Povas okazi ke vi rimarkos kelkajn lingvajn erarejn. Ni antaŭe pardonpetas pro tio.

E. JOUIS -

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## ĜENERALA KUNVENO DE U N E EN GRAND-QUEVILLY la I7 / 3 / I974 .

S-ro Pottier malfermas la kunvenon je la II H 30 antaŭ antaŭ 20 personoj kaj klarigas ke oni ne sukcesis klare difini la postenojn de la estraranoj post ilia elekto en I972.

Oni tuj decidas voĉdoni pri tio. La voĉdono havas la jenan rezulton :

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto | : | S-ro QUILLAUD |
| Vicprezidanto | : | S-ro GIBAUX |
| Sekretario | : | S-ro POTTIER |
| Kasisto | : | S-ro JOUIS |
| Delegito pri Informado | : | S-ro LEMARCHAND |
| Membroj | : | S-ino LAVALLEE |
| | : | S-ro MARTIN |

Oni poste diskutas la temon de la Normanda Bulteno. Ĉar neniu grupo proponis sin por tiu tasko, S-ino Peltier bonvolas daŭrigi tiun laboron.

La kunveno finiĝas proksimume je la I2a horo.

P. POTTIER

---

## ĜENERALA KUNSIDO DE LA NORMANDA FEDERACIO en GRAND-QUEVILLY, la I7 / 3 / I974

La jarkunveno de la Federacio okazis dimanĉon matene en la granda salono de la kongresejo. Post unuanima aprobo de la morala kaj financa raportoj, oni renovigis I/3 de la konsilio : S-ro Jouvin - F-ino Pannier - S-ro Pottier - kaj S-ino Vincent estis elektitaj.

Post diskuto pri starigo de l[illegible], la asembleo decidis pli larĝe uzi la ekspoziciojn kaj prelegojn kiel informrimedojn ĉar ŝajne ili plej efikas.

S-ino Vincent reprezentas la Federacion en la Nacia Kongreso en Saint-Etienne.

La venonta kongreso okazos en Les Andelys la I5-I6/3/75.-

P.Pottier -

## U N E : KUNVENO DE LA ESTRARO -

-:-:-:-:-:-

La Estraro de nia U.N.E. kunvenis la 9an de Junio en Yvetot.

La ĉefa diskutotomo estis la Studo de nia amiko P. Lemarchand (vidu bultenon N° 20) Grava, interesa laboro; Ne eblas unun prezenti al vi koncize la farotan laboron ... sciu tamen ke elstariĝos baldaŭ agadplano en la kadro de U.N.E.

---

## VIVO DE LA GRUPOJ

;-;-.-.-.-.-.-.-.-

### YVETOT -

La kurso daŭras kun 3 lernantoj.

La 6an de Aprilo, 3 Nederlandanoj : S-ino Alida Kwantès S-ro Rob Kwantès kaj F-ino C. Kooy haltis en Yvetot post la kongreso de S.A.T. Amikaro kaj tranoktis ĉe Ges-roj Pottier antaŭ ol foriri al Anglujo por ĉeesti alian kongreson.

Dum la vespero, ili prezantis en la Junuldomo interesajn lumbildojn pri sia lando kun klarigoj en Esperanto. S-ro Pottier tradukis por la komencantoj kaj la ne-esperantistoj. La direktoro de la Junuldomo ĉeestis la prezentadon.

P. Pottier

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

### TROUVILLE S/MER -

IO gelernantoj daŭre partoprenis la kurson, ĉiun merkredon, en la Junulardomo/

La dimanĉon 24an de Marto, la Grupo, helpita de U.F.E., starigis budon sur la vendejo kaj reklamis por Esperanto al aĉetantoj kaj turistoj, disdonante multajn propagandfoliojn.

La I6an de Aprilo, 25 personoj ĉeestis nian letervesperon. Ni ricevis 80 poŝtkartojn kaj leterojn el 23 landoj.

.../...

... Ni akceptis gêrmanan samideanon, S-ro Rawyler, kaj Gesinjoroj Martin el la Grupo de Lisieux. La vespero sukcesis kaj la lokaj gazetoj favore raportis.

La 29an de Aprilo, S-ro Tailpied parolis pri Esperanto kaj faris projekcionon antaŭ 20 gelernantoj de la klaso 4 A en la " C.E.S. René Coty ", en la kadro de la " IO procento ".

F. TAILPIED -

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

LE HAVRE -

Denove funebras la Grupo en Le Havre ...

La Fondinto de la Grupo, S-ro Emile GASSE, mortis en sia 93a vivojaro, la 20an de Marto en Hyères, Francujo, kie li restadis depost kelkaj jaroj. Esperantisto ek de la jaro I900, S-ro Gasse estis unu el la malmultaj postvivantoj de la Kongreso de Boulogne en I905.

Li organizis kaj gvidis mult[illegible] kursojn en Le Havre, inter alie en la Supera Komerca Lernejo. Li verkis kelkajn librojn en Esperanto, kaj tradukis el la franca : " Eŭgenio Grandet " kaj " Vivo de Jesuo " .

---

Ni memorigas al la Grupanoj la ĉiumonatan kunvenon, okazanta je ĉiu tria sabato de la monato, je la I7a horo, ejo François Ier (krom dum Julio kaj Aŭgusto) Ĝenerala plano de la kunvenoj : Informoj, gramatika punkto, paroladeto kun komentarioj....

---

Kun plezuro, ni konigas la [illegible]on de F-ino Laurence CARON ( I2 jara ) kiu trapasis la ekzamenon : Supera Atesto pri Lernado. Gratulon !

---

.../...

VII

## EKSTRAKTOJ EL LA PAROLADETO DE S-ro LETAILLEUX, PRI LIA PARTOPRENO EN LA KONGRESO DE SAT-AMIKARO EN AGENO

---

... dum sabato, mi atingis Agenon je la I4a horo, post agrabla vojaĝo en kies lasta parto la vojo iras inter, maldekstre arbaro, kaj dekstre, fervojo kaj rivero Vienne. Kiom agrabla, por ĉiu kiu ŝatas naturon...

Jen la Kongresejon : tuj ĉe la akceptejo oni sentas simpation. Oni ricevas programon por la kvar tagoj, planon de la urbo : oni povas vidi la lokon de la Kongresejo, restoracio, stacidomo, la hoteloj ...

Mi rakontos al vi pri la promenadoj, sed en tiu Kongreso, ne estis nur promenadoj, sed ĉefe laboro : laborkunsidoj 9-I2 H kaj I3.30-I9 H ! Mi kostatis ke, en ĉiuj laborkunsidoj ĉeestis ĉ ĉiam multaj geesperantistoj, la ĉambro estis ĉiufoje plena. Kaj estas interese raporti ke oni parolis nur en Esperanto, en bona Esperanto kiel mi ŝatas. Eĉ en restoracio oni ne aŭdis la francan lingvon...

Kun kelkaj gekamaradoj, mi vizitis parton de la urbo, transirante la Garonne. Vespere, muziko kaj kantoj. Dimanĉo tagmeze : bankedo kun multaj paroloj. Posttagmeze, ekskurse al Moissac, vilaĝo Golfech, kie estos Atomcentralo, kaj Auviller, mezepoka vilaĝo, nun preskaŭ dezerta.

Lundo dediĉita nur la laboroj. Dum mardo okazis ankoraŭ unu granda ekskurso : Bonaguiz, la kastelc Monflankin, kie restoracio plej ĝentile akceptis nin. Ne [illegible] simpla manĝo ! Aŭskultu : salikokoj, tranĉaĵoj de fiŝo kun legommiksaĵo, ovo kun majenezo, bovido rostita, verdaj pizoj kaj sekaj prunoj, fromaĝoj, kuko alkoholumita je " Armagnac " ..... kaj ruĝa vino laŭvole .... vi opinias, kiel mi, ke estas bona manĝo ! Kaj elirante, aŭbadon de muzikistoj sur la placo....

.../...

.... Rapide, ni aŭtobusiĝis por Ageno. Kelkaj Km antaŭ la alveno, mi parolis kun generderlandanoj kiuj precize konas S-ron Huet el Le Havre ! mi devas prezenti iliajn memoraĵojn al tiu amiko....

... Jen Ageno, kie oni disiĝas, dirante " Ĝis Revido " al ĉiuj kamaradoj....

R. LETAILLEUX -

-;é:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

PLIAJ VORTOJ EL LA KASISTO

Depost la apero de la lasta Bulteno, mi ricevis averton pri ŝanĝo de la litero de nia poŝtĉekkonta numero. Nun vi devas sendi vian kotizon por U.N.E. kaj ties Bulteno (ĉiam 2 frankojn, aŭ pli ...) al :

UNION ESPERANTISTES - ROUEN 283 - 40 H

Tamen, se vi erare uzis la antaŭan literon : E, la pago atingos min.

Antaŭdankon !

E. JOUIS

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Polycopié par le

GROUPE ESPERANTISTE HAVRAIS

DEPOT LEGAL :

2ème Trimestre 1974

La gérante : N. P[illegible]r -

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-